Jaro I — Nº 4 · ESPERANTO · Barcelono-Septembro-1909

# JEN



Kompreneble ili estas riĉaj! Ili havas la numeron 13 sur la pordo!

LA FIRMO

# HACHETTE KAJ Kio

79, Boulevard Saint-Germain

Paris

DECIDIS KLARIGI ĈIUN MISTERON.
TIAL POST LA ***MISTERO DE DOLORO*** DE A. GUAL, TRADUKITA
:: DE FRED. PUJULÁ, ĜI ELDONIS ::

# *Mistero de Amo'n*

de Sinjorino **N. Kolowrat**

Kiun oni povas havigi al si per **1'25** frankoj

**Saĝaj esperantistoj ne devas legi**

# FRENEZO'n

DE **FRED. PUJULÀ**

SED ĈIU RAJTAS ĜIN AĈETI PER **1** FRANKO
ĈE HACHETTE MEM KAJ KORESPONDANTOJ

# JEN

## La rabatbileto de Sro. Alabau

Sro. Joaquim Alabau estas tre eleganta samideano. Post Petronius (Vidu QUO VADIS), le Bargy kaj reĝo Eduardo, sinjoro Alabau estas la plej eleganta viro loĝanta en nia planedo. Lejeune de Parizo, la firmo «Old England» de Londono, Pascual y Casas de Barcelono, ĉiu fama tajloro de la mondo kuradas post li kun peto, ke li bonvolu surporti iliajn tajlaĵojn.

Rilate al eleganteco, Alabau, nia kara amiko estas heroo. Li estas sufiĉe kuraĝa por surmeti al si ĉokoladkoloran pantalonon, se la modo konsilas ĝin, kaj ŝuojn, en kiuj ne havas lokon la piedoj, se la modo estas dolora. Krom eleganta, sinjoro Aalabau estas fervora esperantisto kaj obstina viro. Li decidis antaŭ tri jaroj lerni nian lingvon, kaj ankoraŭ li daŭras en sama decido. Tamen — kompreneble — li scias diri: fraŭlino! Tago venos kiam li ne estos plu konsekvenca, kaj fine povos diri, ke li lernis!

La moroj de sinjoro Alabau estas tre simplaj, kvankam oni povas kredi male. Donu al li pantalonon bone falditan, cigaredujon bone emajlitan, kaj ĉapelon kun broseto en la internaĵo, kaj la mondo estos por li rozkolora. Dum la Kongreso de Dresdeno, li multe ĝuis en la mekanikaj restoracioj, kie li elspezis kelkcenton da markoj eligante el la maŝinoj buljonon, fromaĝon, kukojn, k. t. p. Kiam li alvenas en urbo, la unua afero, kiun li faras estas sendi al si mem centon da poŝtkartoj; li havus mirindan kolekton se li ne forgesus iri repreni ilin ĉe la restanta kuriero. Alabau estas gloro de Katalunujo, kaj ni ne dubas, ke post lia vivo la katalunoj dankemaj konstruos al li monumenton sur la pinto de la Tibidabo mem

Antaŭ kelkaj tagoj, li fariĝis kongresano de la 5ª Kongreso. Ni renkontis lin aranĝantan sian kravaton antaŭ la spegulo de kafejo. Li montris al ni sian kongreskarton kaj sian rabatbileton.



— Nenecese ke vi diru, kio okazis al vi; vi elpensis aereoplanon.

— Por kio taŭgas la kongreskarton? — li demandis.

Ni respondis la demandon kiel eble plej klare por ke li komprenu. Li komprenis, kaj ridetante kun ĝojo li zorge gardis la karton en la poŝon. La ideo, ke li povos ĉeesti Balon ĝojigis lin.

— Por kio taŭgas tio ĉi? — li redemandis montrante la rabatbileton.

Ni klarigis, ke ĝi taŭgas por vojaĝi per la duono de la ordinara prezo. Lia vizaĝo fariĝis malhela, tre rimarkeble, malgraŭ lia brunegeco.

— Kio okazas al vi, nia kara! — ni ekĝemis timante por lia sano.

Li respondis: — Tiu bileto taŭgos neniel por mi. Kiel mi povos uzi ĝin por veni al Barcelono? Mi estas ja en Barcelono mem!

La sekvantan tagon ni renkontis denove nian amikon. Li premis nian manon adiaŭante nin.

— Kiel! Ĉu vi forvojaĝas?

— Jes, karulo, mi iras al Parizo.

— Nu! Ĉu vi ne deziras ĉeesti la Kongreson?

— Kontraŭe, mi tre deziras ĉeesti!

— Do!

— Mi iras al Parizo por reveni kun la karavano profitante la rabatbileton!



—La sinjoro ne povas venir ĉar Ramono la pordisto rompis al si kruron en la fabrikejo.
—Mi ĉiam pensis, ke tiu knabo estas socialisto; jen li kripliĝas ĝuste hodiaŭ, dum la tago de l'kermeso!

## Avizo grava al la legantoj.

Sinjoroj Pau Baldruch kaj Duran, kies belegajn leterojn legis kun tiom da plezuro niaj legantoj, petas de ni, ke ni avizu la publikon, ke nun pro la multega laboro, kiun ili havas okaze de la Kongreso, ili ne povas sin okupi pri literaturaj aferoj.

Konfidencie, ni povas diri, ke malgraŭ ilia senkulpigo, la vero estas ke ili intermalpaciĝis pro artaj kontraŭopinioj. Ni bedaŭras tion, kio malebligas al ni la ĝuadon de ties interesaj prosaĵoj.

La tuta Redakcio kaj la Administranto.



—La virto malbonigis mian sorton. Nun, mi havus aŭtomobilon, kaj anstataŭ kopii tiun ĉi senhontulinon eble ŝi kopius min.

Unufojon, sinjoro Couturat eniris en la Apotekon de Sinjoro Peloille por aĉeti boteleton.

—Kion kostas boteleto?—demandis li.

—Ĝi kostas unu frankon,—respondis Sinjoro Peloille kun sia kutima afableco,—sed se en la botelo estas io, ĝi kostos nenion al vi.

—Bonvolu, do, aldoni al ĝi korkŝtopilon,—rediris la aĉetonto.



—Kun kia ĝojo mi pentus!



FEMINISMO

Kiam Sinjoro Chavet estis infano,—tio povas okazi al ĉiu!—multe ŝatis la dolĉaĵojn. Unu fojon amiko lia rakontis sonĝon, kiun li sonĝis dum la nokto.

—Jen ni eniris en kukvendejo, kies mastro donis al ni la permeson manĝi ĉion ajn. Ni manĝis karamelojn, krakenojn, mielon, kukojn...

—Kiuj vi estis?—demandis Chavet senpacienca.

La rakontinto pensis momente kun la polekso en la buŝo kaj respondis:

—Peĉjo... Manĉjo... Arturĉjo...

—Ĉu mi ne estis?—eksopiris Chavet.

Lia amiketo pensis, rigardis la ĉielon, repensis, kaj fine diris:

—Ne, vi tute ne estis.

Chavetĉjo ekploregis plej senkonsole!




LA VERDA STANDARDO

—Kiel! Ĉu vi havas nenion esperantistan en tiu ĉi kafejo?

—**Jes**, sinjoro, ni havas mintlikvoron!




— Kiam mi ludis kun Zamenhof en la lernejo...
— Kion vi rakontas, vi, tiel juna... ?
— [illegible] sia tempo?



—Vi diris, ke vi tiel multe amas min, kaj hieraŭ mi vidis vin en la Akceptejo kun unu el viaj amikinoj.
—Sed mi estis kun panjo!


—Ĉu oni povas sendi verdan saluton al samideano?
—Kompreneble, jes; ĝi estus ĝentilajo.
—Kaj stelan saluton?
—Ankaŭ. La stelo estas nia insigno.
—Kaj kvinpintan saluton?
—Hum! Tio ja povus ŝajni vangofranpon!!




—Jen mistero, kiun mi ne povas klarigi al mi: kial estas tiom da amo en la *Mistero de Doloro*, kaj kial tiom da doloro en la *Misteroj de Amo!*




—Bleuriot? Wright? Monoplanoj? Biplanoj? Pse! Mi konfesas, ke mi nur havas fidon al la direkteblaj balonoj.



MONTRANTE LA DOMON

— Jen la pordo por eniri en la grenejo.
— Kaj la pordo por eliri, kie ĝi estas?

---


## NE ABONU LA GAZETON **JEN**

Unu jaro. . . . . . . 3 Fr. (1,200 sm.)
Jarduono. . . . . . . 2 » (0,800 sm.)

**Plumdirektoro: Fred. Pujulà. — Krajondirektoro: Apa.**

Eldonisto: RAMON FARRÉ str. Portaferriça, 17, BARCELONO. (Li petas, oni faru la pagon per la «ĈEKBANKO ESPERANTISTA» Merton Abbey. LONDON SW.)

**REPREZENTANTOJ.**

—G. Warnier, «Librairie de l'Esperanto» 15, rue Montmartre, Parizo.
—Möller & Borel, «Esperanto Ver ag» 18/19, Lindenstr. BERLINO SW.
—Andr. Fred. Host & Son, Kg. L. Hofboghandel. Bredgade, 35, KJOBENHAVN.
—«The British Esperanto Association» Museum Station Buildings, 133-6, High Holborn, LONDON. WC.
—Libroeldonejo «Esperanto» — Valovaia, kv. 5.—MOSKVA.



Franca karikaturo pri kombaĵoj. — Jaro 1870ª



NE ABONU ANKAŬ

## PAPITU'n

Kataluna satira karikatura gazeto.
Aperas ĉiusemajne.

ABONO:

**Hispanlando:** jarkvarono . . . . . . . 2 Ptoj.
**Fremdlando:** » . . . . . . . . 3 »

**PELAYO, 35 - BARCELONO**



"ESPERANTO VERLAG MÖLLER & BOREL,,

LINDENSTR. 18/19. BERLIN. SW.

## La "Esperanta Biblioteko Internacia,,

ELDONATA DE TIU FIRMO, ESTAS LA PLEJ MALKARA

0,10 SM. LA LIBRETO

LOKO LUEBLA

**Neniu malbona esperantisto legas la**

## "FRANCA ESPERANTISTO,, 'n,

KIUN ONI ABONAS EN

46, BOULEVARD MAGENTA, PARIS


Esperanta Presejo de J. Horta.—Méndez Núñez, 3 y 5.—Barcelono.



LA STRIKOJ

—Mi ne povas ne pensi pri la malfeliĉaj strikuloj; verŝu al mi pli da ĉampanvino; eble mi forgesos.